



ESPERANTO NORMANDA BULTENO

unuigo de normandaj esperantistoj

FN PER ANC 47

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 02 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 45 Frankoj. Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO

+++++

Kvankam esperantisto de multaj jaroj, mi ne havis, ĝis nun eblecon partopreni Universalan Kongreson.

Do, la 83a Universala Kongreso okazinta en Montpellier de la 1a ĝis la 8a de Aŭgusto estis por mi grava evento kiu tre kontentigis min pro agrabla etoso kaj bona organizado.

Mi estis jam partopreninta E-aranĝojn kun kelkaj centoj da partoprenintoj sed en Montpellier, venis 3133 gekongresanoj el 66 landoj.

Beleco de la urbo, belega varma vetero (nur unu tagon pluvis), komforto de moderna kongresejo "Corum" kontribuis al sukceso de tiu kongresego.

Loĝantaro de Montpellier bone konstatis la ĉeston de tiuj "apartaj" turistoj rekoneblaj pro siaj baĝoj kaj pro lingvo parolata. Sur apuda promenejo "l'Esplanade", sur stratetoj de malnova urbo, ĉe surstrataj kafejoj kaj restoracioj, oni renkontis tiujn aziajn aŭ afrikajn aŭ eŭropajn vizaĝojn plej ofte junajn (meza aĝo de partoprenintoj : 51 jaroj). Multaj afiŝoj estis gluitaj ĉie en la urbo, sur muroj kaj sur paneloj. Lokaj gazetoj raportis pri la kongreso. Rok-koncerto, kantoj kaj dancoj okazis ekstere de la kongresejo por neesperantista publiko.

Malgraŭ tio, urbestro de Montpellier ne ĉeestis la solenan malfermon : nur vicurbestrino salutis kongresanojn.

Ankaŭ ne venis la Alta Protektantino: ministrino pri junularo kaj sporto. Ne venis la Honoraj Komitatanoj (krom la kantisto Guy BEART kiun mi ne aŭdis ĉar mi ne povis resti ĝis la fino). Ili skribe salutis la kongreson; ankaŭ skribe salutis ambasadoroj de 7 landoj, Ĝenerala Direktoro de UNESCO, Ĝenerala Sekretario de U.N. Kofi Annan, la Prezidantoj de la 2 Parlamentaj Ĉambroj, Boutros-Ghali kaj kelkaj aliaj eminentuloj

Normandoj estis sufiĉe multaj:

el Grand Quevilly: M.L.Jourdaine, Ch.Millet, Ph.Freslon, D.Leroy, P.Quillaud

el Rouen: A.Bessière, ge-P.Berlot

el Yvetot: P.Pottier

el Fécamp: J. Lesueur

el Hérouville-Caen: Y.Bachimont, J.Magerel, M.Guionie, O.Masseron, Y.Nicolas, ge-A.Tailpied

La grupo de Hérouville invitis Rusojn de ĝemelita urbo Tiĥvin. Iun vesperon, ni manĝis kune kaj amike en restoracio. Post la kongreso, Tiĥvanoj pasigis semajnon en Hérouville. Esperanto-Normandie kontribuis per subvencio al plilongigo de vojaĝo de tiuj rusaj amikoj.

La programo estis tre riĉa kaj estis ofte malfacile elekti inter la diversaj eroj. La kongresa temo estis : "Mediterraneo, ponto inter kulturoj".

Jen kelkaj okazintaj prelegoj: Hispanaj rifuĝintaj en Francio, Bahaismo, Ĉirkaŭmonda vojaĝo, Kamizardoj, Kataroj, Okcitana literaturo, Lingvistiko de Esperanto, ktp... Kunvenis fervojistoj, instruistoj, gejoj, katolikoj, komunistoj, ĵurnalistoj, sennaciistoj, juristoj, mondcivitanoj, kuracistoj, skotoj, verduloj kaj multaj aliaj...

Ni ĝuis multajn koncertojn kaj teatraĵojn. Gimnazianoj el Jogodina (Serbio) altnivele prezentis: "Rekviemo por la perdintoj"; ili ludis kvazaŭ profesie kaj oni petis ilin reludi alian tagon por tiuj kiuj ne povis spekti la unuan fojon. La Kompanoj, teatra grupo de Esperanto-Gironde omaĝis al kantisto Georges Brassens; partoprenis Jacques Yvart kiu ĵus registris diskon (KD) kun kanzonoj de Brassens.

Ekskursoj, bankedo, balo faciligis interkonatiĝon.

La nova prezidento de UEA estas Aŭstraliano: Sro Enderby kiu estis justic-ministro en sia lando.

Sabate 8an de Aŭgusto, kunvenis francaj samideanoj por festi la centjarecon de Franca Esperanto Movado.

Resume, la UK estis la plej impona kaj vizitata mondkongreso de post la jubilea jaro (1987) Venontjare en 1999, la UK okazos en Berlino kaj en 2000 en Tel-Aviv.

Un congrès universel est à la fois un lieu de travail et une fête. Il est dommage qu'encore une fois les grands médias ne soient pas venus constater la valeur de notre langue. Il est regrettable que le journal "LE MONDE" ait fait paraître un article dévalorisant alors que son journaliste n'a même pas mis les pieds au congrès. Il est regrettable que la presse ait insisté négativement sur quelques éléments marginaux de notre mouvement (les amis des chats, l'association des non-fumeurs, le spiritisme....) Il aurait été préférable que les médias posent le problème de fond : L'Europe-a-t-elle besoin d'une langue commune (et non unique) et si oui, l'Esperanto convient-il ?

Petro KIJÓ

SOUVENIR D'UN PREMIER CONGRES (par un jeune)

"...La vision du palais des congrès de Montpellier, en ce 1er août 98, rempli du brassement de 65 cultures venues des 4 coins de l'univers a dépassé tous mes songes: le Corum avait ce jour là une taille galactique.

D'ailleurs, j'ai cru, pendant une semaine, être dans un autre monde. J'ai appris tant de choses, tant de valeurs... Il est si merveilleux de pouvoir se faufiler à travers cette foule aux mille couleurs pour parler tout à coup avec un asiatique, une africaine, un russe ou une suédoise des coutumes de sa contrée ou de la mienne! C'est d'autant plus merveilleux lorsque, par chance, on rencontre un jeune avec lequel on partage des goûts communs: ce fut une expérience pour moi que de savoir à quoi ressemblait le reggae japonais, ou les concerts de punk au Brésil...

Bref, je n'ai aujourd'hui qu'une envie: partir à Berlin l'an prochain! Il est si difficile de faire partager la magie d'un congrès mondial à quelqu'un qui n'en a pas vécu, c'est pourtant ce qui décuple le pouvoir de l'Esperanto! Je suis tout de même heureux de partager cette magie avec les autres jeunes de JEFO qui sont eux aussi venus à Montpellier et que je salue avec tous les autres jeunes espérantistes de la galaxie..."

VINCENT

(extrait de JeunEsperanto organe de JEJO)

SAT KONGRESO EN ODESSA (UKRAJNIO)

La kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazis de la 18a ĝis la 25a de Julio kun la kutima kamaradeca etoso. Organiz-Kongres-Komitato renkontis multajn malfacilaĵojn kaŭzitajn grandparte pro la politika ĥaoso kiu regas en tiu lando (de 6 monatoj Odeso ne havas urbestron ĉar ili ne sukcesas elekti lin !)

Malgraŭ tio, kongresanoj bone profitis koncertojn, folkloran dancgrupon, ekskursojn, banadon en Nigra Maro, vingustumadon, bankedon, dancadon, ktp...Okazis multaj prelegoj kaj viglaj diskutoj dum laborkunsidoj.

Venonta kongreso okazos de la 24a ĝis la 31a de Julio en Ĉeĥio, en Karlovy Vary (Karlsbad).

Antaŭ-kongreso okazos en Ĉeske Budejovice.

Postkongresa ekskurso kondukos vin al Berlino por partopreni la Universalan Kongreson !

NORMANDA BULTENO

La junia numero 196 estis sendita de mi mem. Mi daŭrigos sendadon de venontaj.

Ni devas danki Maryse kaj Pierre LEMARCHAND kiuj sindoneme redaktis kaj sendis la bultenon. Post ŝanĝo de redaktoroj, ili ankoraŭ prizorgis dum multaj jaroj multobligadon, enkovertigon kaj sendadon de nia ligilo, kvankam ili ne plu estis membroj de la estraro.

Mi ŝanĝis la formaton de Normanda Bulteno: Pro tio ke per komputero, eblas malgrandigi literojn, ne plu utilas duonigi la formaton. Tamen la enhavo ne estos pli grava ĉar per poŝtmarko je 2,70 F, oni povas sendi nur 3 foliojn. (kun 4 folioj poŝtmarko kostus :3 F 50)

ATTENTION : *En raison d'un problème avec les étiquettes-adresses autocollantes, quelques bulletins du mois de Juin (196) sont revenus à l'expéditeur parce que l'étiquette adresse était décollée. Que ceux qui n'ont pas reçu le bulletin 196 me préviennent; je leur enverrai un autre exemplaire*

ESPERANTO NORMANDIE

COTISATIONS ABONNEMENTS 1998

Voici la deuxième liste des abonnements - cotisations pour l'année 1998.

Beaucoup d'entre vous n'ont pas encore envoyé la participation financière dont nous avons besoin pour continuer notre action.

Ci- dessous le "tableau d'honneur" de ceux qui ont déjà réglé leur cotisation; si votre nom ne figure pas dans cette liste c'est que vous avez oublié; nous vous remercions de bien vouloir réparer votre omission.

Gesinjoroj: Angenault, Bachimont, Bataille, Bessière, Bonnet, Boucher, Boudet, Caron, Chalm, Defrance, Deuff, Domingo, Dubois, Duflo, Etienne, Gibaux, Giordano, Guérault, Guerre,* Helbert, Haulard, Huet, Jourdain, Klein, Lamy, Langanay, Lebrun, Lecouvreur, Legros, Leguillon-Décosse, Lemarchand, Leroy, Lesueur-Comte, Levesque, Lévy, Loisel, Loison, Longuet, Magerel, Masseron, Marie, Mary, Maurouard, Mendès, Michaud, Millet, Moyon, Nardin, Peltier, Pillet, Pottier, Quillaud, Rauch, Robiolle, Roblin, Séry J, Séry S, Tailpied, Téani, Touileb, Varneville, Zilliox, *GUILMOT

Le 24 Septembre, nous n'avons donc reçu que 62 cotisations alors que nous éditons 160 exemplaires. Si nous enlevons 40 exemplaires envoyés gratuitement à des associations, à d'autres revues, à de nouveaux élèves, cela signifie qu'il y a environ 60 retardataires. Evitez nous la peine de vous envoyer une lettre de rappel . Envoyez nous un chèque ou faites nous savoir que le bulletin ne vous intéresse plus. Merci.

GRAND QUEVILLY:

Le konversaciaj kunvenoj okazos denove ĉiujarde ekde 17 h 45 en ĉambro n° 2 de Centre Socio Culturel, Avenue Kennedy. Esperantistoj de Rouen estas invitataj

Ni ne scias ĉu estos kandidatoj por elementa kurso

FECAMP:

Biblioteko de Fécamp: Libroj : Le Défi des Langues, le Que sais je?, Que vive la langue française et que vive l'Espéranto estis plurfoje pruntitaj el la urba biblioteko. Mouloud rediras sian sugeston inciti al aĉeto de tiuj libroj (aŭ eĉ donaci) por ĉiuj urbaj bibliotekoj. Jeannine Lesueur partoprenis UK kaj aperigis artikolojn en "Le Progrès de Fécamp", en "Le Courrier Cauchois" kaj en bulteneto de emerituloj.

Mouloud atentigas pri valoro de propagandiloj glueblaj sur minitelo de poŝtoŭficejo aŭ en telefonbudo. Uzo de T.ĉemizo kun esperanta subskribo povas ankaŭ efiki; tion li konstatis okaze de edziĝbalo. Li akiris la viddisketon de Romain Langlois; li esperas povi ĝin uzi por infanetoj de lernejo Rabelais; li bedaŭras foreston de prononcado.

Mouloud kaj Taous ne partoprenos ĉi jare la ekspozicion pri radiokomunikado; ĝi fariĝis tro komercema.

Ili ĉeestis, dum julio, staĝon de monitoro pri "rika metodo" (Inf. 02 35 29 99 88)

Taous komencis korespondadon kun infanoj el Bosnio kiuj ĉeestis SAT Amikaran kongreson en Quintin.

NORDFRANCA-EŬROPA ESPERANTO RENDEVUO

Ĝi okazos en Hazebrouck (59) la 7/8 ajn de Novembro. (Nordanoj atendas Normandojn !)
Legu programon kaj sendu aliĝilon kiun vi trovos ĉi kune

LE COURRIER CAUCHOIS du 29-08-98

Une Fécampoise au congrès international d'espéranto à Montpellier

Quarante ans après sa participation au congrès international d'espéranto de Mayence (Allemagne), une Fécampoise, Mme Jeannine Lesueur, était présente au 83^e congrès international d'espéranto qui s'est tenu à Montpellier du 1^{er} au 8 août dernier.

De retour à Fécamp, elle se souvient de l'époque où Fécamp avait une section d'espéranto qui marchait très bien. Elle raconte cette aventure : « Je m'étais promis de revivre un congrès international, ce sera le dernier pour moi et je suis heureuse de l'avoir fait. Lorsque j'ai appris, il y a deux ans environ, que le congrès international d'espéranto se déroulerait en 1998 à Montpellier, je me suis promis de mettre tout en œuvre pour y participer en guise d'anniversaire, quarante ans après celui de Mayence.

C'est ainsi que je me suis retrouvée le samedi 1^{er} août dans la salle des rencontres du Corum, palais des congrès de Montpellier, où les congressistes venaient retirer leurs documents au fur et à mesure de leur arrivée dans la capitale languedocienne.

Durant toute la journée et aussi le soir, les 3 133 participants, venus de 62 pays différents, ont pu, au hasard des rencontres, renouer connaissance avec les espérantistes rencontrés lors de précédents congrès ou créer de nouveaux liens et tout cela sans l'aide d'interprètes.

L'inauguration du congrès eut lieu le dimanche matin dans la salle du Corum. Après lecture des messages de bienvenue envoyés par Mme Buffet, ministre français de la Jeunesse et des Sports, par le directeur général de l'Unesco, par le secrétaire général des Nations Unies, et par M. Georges Prêche, maire de Montpellier, eut lieu la présentation du thème du congrès : « Méditerranée, pont entre les cultures ». Sans aucune aide artificielle (appareil de traduction), tous les participants ont pu suivre, pendant près de deux heures, les différents débats et recevoir les messages de bienvenue des représentants des 62 nations présentes.



Jeannine LESUEUR est allée à (Mayence) Montpellier

Durant toute la semaine, conférences, concerts, réunions à thèmes (aveugles, médecins, cheminots, masseurs kiné, radio amateurs, instituteurs, journalistes, citoyens du monde, médecins homéopathes, non-fumeurs, collectionneurs, etc.) ont eu lieu dans différentes salles du Corum. Un groupe d'étudiants serbes de Jagodina, qui ont commencé à apprendre l'espéranto il y a à peine un an, dont le professeur M. Z. Ivanovic a épousé une Fécampoise en 1956, a interprété avec succès une pièce de théâtre Requiem pour les perdants.

Les congressistes ont pu se divertir le soir, tout au long de la semaine : soirée occitane, concert de rock, bal, concert classique, soirée artistique internationale, tous les chants et poèmes étant bien sûr interprétés en espéranto.

Ils ont pu également découvrir la région grâce aux diverses excursions proposées et laissées au libre choix de chacun. C'est ainsi que le mardi matin, six cars emmenèrent les amateurs de sites moyenâgeux visiter Carcassonne, tandis que d'autres congressistes découvraient Avignon, Anduze et sa bambouseraie, la grotte des Demoiselles ou la Camargue. Dans les cars et autour des tables de repas, les participants, qu'ils soient anglais, allemands, russes, polonais, japonais, grecs,

lituaniens, brésiliens, australiens, argentins, belges, finlandais, islandais, israéliens, italiens ou congolais, entre autres, ont pu converser tous ensemble en une seule langue : l'espéranto.

Des excursions d'une demi-journée ont permis également de faire connaissance avec la région plus proche de Montpellier.

Après une semaine bien employée par les congressistes (200 rendez-vous étaient prévus), la cérémonie de clôture eut lieu le samedi 8 août. Après quelques mots de Guy Beart, membre du comité d'honneur, le congrès, saluant le 50^e anniversaire de la Déclaration des droits de l'homme, dont le respect est et reste la condition essentielle de travail pour l'espéranto, a demandé aux Nations Unies qu'elles donnent une plus grande attention et cherchent une solution au problème de la dimension linguistique des droits de l'homme.

Il a demandé à l'Unesco et aux diverses organisations mondiales qu'elles mettent la langue internationale espéranto et ses valeurs au service de l'évolution du monde actuel dans la paix et la tolérance.

Rendez-vous fut pris pour les prochains congrès internationaux : Berlin en 1999, Tel Aviv en l'an 2000 et Zagreb en 2001. Vivu esperanto!

UNUIĜO de la NORMANDAJ ESPERANTISTOJ

ĜENERALA ASEMBLEO 1999

INVITO

*Vi estas kore invitataj al la Ĝenerala Asembleo, kiu okazos en Saint Lo (50)
"KULTURA CENTRO JEAN LURCAT "
la 11an de Aprilo 1999 je la 14a horo / ĝis 17a 30*

=====

La membroj de la estraro kunsidos matene la 10an horon (sama loko)

Informoj


*Loko ... Kultura Centro ,
placo de "Champ de Mars" , antaŭ poŝtoŝejo*

=====

*Restoracio ... RESTAUMARCHE ... Malfermita , ĉiujn tagojn
ZAC de " Bois Ardent " Saint Lo*

=====

*Por kiuj deziras, eblas rezervi gruptablon por kune manĝi, oni proponas
per 80.00f (sen trinkaĵo)*



*Entrée (Buffet au choix)
Plat kun garnaĵoj
(Raie aux capres ou Magret de canard)
fromage - Dessert*

plie trinkaĵoj (po 35.00 botelo ĝis).

ESPERANTO "MANIKO"

Jen, nia historio !

Antaŭ unu jaro, kelkiuj interesiĝis pri la praktiko de Esperanto, ni do kontaktis dudekon da konatuloj. Deko nur respondis favore al kreado, kaj kune ni kreis en la departemento 50, novan grupeton da Esperantistoj, kies plej gravaj celoj estas kunveni kune por pli ofte, praktiki la lingvon sed ankaŭ por konigi ĝin al la loĝantaro el tiu parto de Normandio. Ni sciis, ke jam ekzistis E-ista grupo en Kalvados, sed la distancoj por veturi, ne ebligis al ni, kuniĝi regule al ili. Post ses monatoj ni provis propagandi pri nia afero, kaj pere de loka gazetaro, ni sukcesis varbi dekdu novajn personojn interesitajn de la lingvo. Dek el ili aliĝis al la grupo kaj pro tio, ni malfermis semajnan kurson ("unua grado"). Plie, la regulaj kunsidoj de la grupo okazas ĉiumonate, la lastan sabaton je 17a ĝis la 20a h. krome lerneajn feriojn. Antaŭ nelonge, ni renkontis amikojn de Herouville kaj ni estis informitaj de amiko Y. Nicolas pri la reorganizo de la U.N.E.


Por interkonatiĝi kun la amikoj de la Unuiĝo, ni konsentis partopreni en la aktivaĵoj, kiam ili okazos. Ni povas ekde nun anonci al vi, ke la 27, 28an de Marto 99 okazos en Saint Lo dujaran "Forumon de la Asocioj" en kiu ni ĉeestos en stando donita de la urbestaro, vi estas kore invitataj viziti nin kiel eble plej multnombraj, ni tiel konigos Esperanto (n). Ĉar komencis nova jaro, nome de la grupo, mi sendas al ĉiuj E-istoj de U.N.E., niajn deziresprimojn de sukceso de Unuiĝo.

Samideane kaj amike


A. MORIO

=====

Pdto : A. Morio tel (02) 33 05 11 99



Kunvenoj de "Esperanto 50"
Espace Associatif du Centre culturel
Place du Champ de Mars 50000 ... St LO



Base de Plein air Nature –
Morbecque-Le-Parc
F-59190 HAZEBROUCK –
Tel. 03 28 43 67 22

Base
PLEIN AIR
NATURE

Kun la kunlaborado de Societo Yvonne MARTINOT (KVINPETALO)
sub aŭspicio de NORDFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

PROGRAMO :

Sabaton la 7an : – ek de la 14. 00a : akcepto (accueil)
– 14. 30a : inaŭguro de la 9a Rendevuo
– 15. 00a ĝis 18. 30a : paralelaj studgrupoj (kun paŭzo: 16.30a – 16.45a)
Post la vespermanĝo, distra vespero (soirée détente après le dîner):
"La Muziko en Suda Ameriko" fare de Hervé GONIN - ĉefredaktoro
de "FRANCA ESPERANTISTO"

Dimanĉon la 8an :

– 9. 00a ĝis 12. 00a : paralelaj studgrupoj
(kun paŭzo: 10.30a – 10.45a)
– 14. 00a ĝis 15. 30a : distra programo dum kiu la
gelnantoj de S-ino Monique Noël prezentos teatran
spektaklon. Jacques Yvart, amiko de Brassens, kantos!
– je la 16. 00a : fermo de la 10a Rendevuo.

GRUPO A	Komencantoj (Débutants)	Gvidanto : F-ino C. VENNIN
GRUPO B	Internacia Rendevuo de Infanoj	Gvidanto : S-ino M. NOËL
GRUPO C	Progresantoj	Gvidanto : S-ro R. WYLLEMAN
GRUPO D	Praktikantoj	Gvidanto : F-ino C. SAMAIN
GRUPO E	Spertuloj: «kvar nomoj, kvar datoj: Zamenhof, Gandhi, Lanti, Privat - 1859, 1869, 1879, 1889»	Gvidanto : S-ro G. LAGRANGE

KOTIZO : 45.00 FF por la tuta-aŭ nur parta-aranĝo. (Cotisation pour une participation totale ou partielle)

VESPERMANĜO + MATENMANĜO + TAGMANĜO + TRANOKTO + VESPERO : 200,00 FF = Pension complète

MANĜO por partopreno nur sabate - aŭ nur dimanĉe - 85 FF.

(Prix d'un repas en cas de participation partielle - ou samedi - ou dimanche.)

ALIGILO : (Bulletin d'adhésion) sendota al (à envoyer à) :

S-ro DIETRICH Jean – 104, rue Jean Jaurès – F59192 BEUVRAGES – FRANCE Tel: 03 27 33 79 31 – antaŭ la (avant le)
31a de Oktobro 1998 kun pago de la kotizo (avec le paiement de la cotisation) – Poŝtkonto (CCP) : M. DIETRICH- 3466
N – LILLE

S-ro, S-ino, F-ino :

ANTAŬNOMO (Prénom) :

AĜO :

PROFESIO :

ADRESO :

TELEFONO :

aliĝas (adhère) al la **GRUPO A B C D E** - (encirkligu la literon de la elektita grupo) (encerclez la lettre du groupe choisi)
kaj pagas sian kotizon (et paie sa cotisation).

– Mi alvenos aŭte aŭ trajne. Se vi indikos la precizan alvenhoron de la trajno, oni akceptos vin en
la stacidomo de Hazebrouck kaj veturigos vin en Morbecque.

– J'arriverai en auto - par le train. Si vous indiquez l'heure de votre arrivée en gare d'Hazebrouck,
un esperantiste vous y attendra et vous conduira à Morbecque.

Dato : Subskribo (signature) :

BONVOLU NOTI (Veuillez noter):

• Alilandaj samideanoj prefere pagu surloke per kontantaŭo por eviti altajn bankkostonojn,
sed nepre sendu vian aliĝilon.

• Ĉekoj ĝireblaj devige al S-ro Jean DIETRICH

• Ĉekoj al adresser obligatoirement à Jean DIETRICH

• Eblas partopreni nur SABATE aŭ DIMANĈE. Tiukaze, precizigu tion.

Il est possible de ne participer que Samedi ou Dimanche. Dans ce cas, le préciser.

• La kotizo estas aldondenda:

– Ĉu al la tuta gastigoprezto

– Ĉu al la prezo de la manĝo (por partopreno nur sabate aŭ dimanĉe)

• La cotisation est à ajouter:

– soit au prix de la pension complète

– soit au prix du repas (pour une participation limitée au samedi ou au dimanche)

